

ASSOCIATION  
ESPÉRANTISTE  
Trimonata revueto  
numero 77

# Esperanto la verda stelo

94

Octobre-décembre  
Oktobro-decembro  
**2013**

## KALENDARO

**APPRENDRE L'ESPERANTO**  
chez soi tranquillement, n'importe quand.  
sur Internet



**lernu.net**



Un logiciel complet, très bien documenté.

On y trouve de l'information, des  
cours de différents

niveaux, un suivi personnalisé, un dictionnaire

### **"FÊTE ZAMENHOF"** **(7 déc. 2013)**

pièce de théâtre (AFCE),  
danse(s) country (UAICF Est),  
chant(s), tombola.  
14h30-17h.  
15 rue Traversière.  
75012 PARIS

### FETE DE L'HUMANITE

Comme chaque année, le  
stand tenu par les associations  
: SAT-amikaro, FET et  
Espéranto France a connu un



vif succès.

### COURS D'ESPERANTO A CHAMPIGNY

Le cours a repris le 7 octobre à Champigny-sur-Marne



Pour toute information : Tereza 01 45 76 10 57

### KALENDARO 2014 francais-esperanto



nur 4 euroj por plezurigi amikojn aŭ propagandi

**Robert LAUDEREAU**  
est décédé le 16 août.  
Il fut longtemps président très  
actif de :

*L'Association Espérantiste du  
Travail.*

*Pendant de nombreuses années, il  
apporta une aide très précieuse à  
notre association lors des fêtes des  
associations : préparant la pâte à  
crêpes, prêtant la crêpière,  
apportant le cidre normand. Ce  
qui permettait, pendant l'attente  
des amateurs de crêpes, de les  
informer sur l'espéranto.*

<p>p. 2 Patricia en Congrès en Islande.                  p. 3 Espéranto-Tour.                  p. 4 Bonjour les « Verts ». Institut de l'Esperanto                  p. 5 Développer secrètement l'Espéranto.                  p. 6 5è congrès d'espéranto en Afrique.                  p. 7 Journée des langues.                  p. 8 Publier des articles sur l'espéranto.</p>	<p>p. 2 Patrisja en kongreso en Islando.                  p. 3 Esperantotur.                  p. 4 Bonan tagon « la Verduloj ». Esperanto Instituto                  p. 5 Ni disvastigu esperanton sekrete.                  p. 6 5a Esperanto-kongreso en Afriko.                  p. 7 Tago de lingvoj.                  p. 8 Aperigi artikolojn pri esperanto.</p>
Imprimerie Spéciale	
Poŝtadreso : LA VERDA STELO – ESPERANTO 94 3 Rue Pablo Picasso Appartement 507 94600 Choisy le Roi Francio / France	Prezidanto : Tereza Sabatier : terezasa@club-internet.fr Sekretariino : Sylviane Lafargue Redaktorino : Tereza (☎01.45.76.10.57) Kasisto : terezasa@club-internet.fr Korektanto : Vito

## Raportaĵo

PATRICIA AU CONGRES EN ISLANDE	PATRISJA KONGRESIS EN ISLANDO
<p>En juillet a eu lieu le 98e Congrès Universel d'UEA (Association Universelle d'Espéranto) à Reykjavik (Islande), la plus nordique des capitales mondiales.</p> <p>J'y ai participé avec les membres de ma famille, bien qu'ils ne parlent pas l'espéranto. Nous étions 4 parmi les 89 congressistes français (le congrès a accueilli 1034 participants de 55 pays).</p> <p>Entendre chanter l'hymne « L'Espero » en espéranto, par des gens de nationalités différentes, utilisant la même langue, a été ma première expérience. J'ai aimé comprendre assez bien, mais parler c'est autre chose ! La soirée nationale, théâtre, concert m'ont bien plu.</p> <p>Des cours de conversation m'ont permis d'apprécier Katalin Kovats et Sylvain Lelarge.</p> <p>Des excursions nous ont fait découvrir des paysages splendides : chutes d'eau, comme Gullfoss, geysers, lacs, icebergs, canions, plaques tectoniques de l'Europe de l'Amérique, le plus actifs des volcans d'Islande, dont l'irruption eu lieu il y a 3 ans, empêchant le vol des avions...</p> <p><b>Le prochain congrès aura lieu à Buenos Aires, mais n'oubliez pas que le 100e aura lieu en 2015 à Lille, en France ! Facile donc d'y participer et d'y aller ensemble. N'est-ce pas ?</b></p> <p style="text-align: right;">Patricia</p>	<p>En Julio, okazis la 98a Universala Kongreso de UEA (Universala Esperanto-Asocio) en Rejkjaviko (Islando), la plej norda ĉefurbo de la mondo.</p> <p>Mi partoprenis kun miaj familianoj, kvankam ili tute ne parolas Esperanton. Do ni estis kvar inter 89 francaj kongresanoj. (kongreso akceptis 1034 kongesanojn el 55 landoj).</p> <p>Ĉar estis mia unua partopreno, la himno «La Espero» dum la inaŭguro estis la unua sperto : aŭdi kanti malsamajn landanojn, kiuj kune uzis la saman lingvon. Mi povis kompreni pli malpli bone, sed paroli estis tute alia afero ! La nacia vespero, teatraĵo, koncerto plaĉis al mi.</p> <p>Paroligaj lecionoj permesis al mi, renkonti estimindajn Katalina Kovatso kaj Silvano Lelargo.</p> <p>Ekskursoj permesis malkovri mirindajn pejzaĝojn : akvofaloj kiel Gulfoso, gejseroj, kiel la Granda Gejsero kiu donis sian nomon al ĉiuj aliaj gejseroj, lagoj, glacimontoj, kanjonoj kiel la kanjono formita de la fordivido de la eŭropa kaj amerika tektonplatoj, vulkanoj kiel Heklao, la plej aktiva vulkano en Islando kiu erupciis antaŭ tri jaroj, malhelpante al aviadiloj flugi...</p> <p><b>La venonta kongreso okazos en Bonaero, sed ne forgesu, la 100a okazos en 2015 en Lilo, Francio ! Do estos facile partopreni kaj iri kune. ĉu ne ?</b></p> <p style="text-align: right;">Patricja</p>
	
<b>CELEBRITES</b>	<b>FAMULOJ</b>
Destiné au barreau, <b>Ernest Archdeacon</b> s'orienta vers l'étude des sciences modernes (aérostation, aviation). Il apprit l'espéranto en 1908. Il publie " <b>Pourquoi je suis devenu espérantiste</b> " (1910), Élu président de la Société Française pour la Propagation de l'Espéranto en 1925, il fut jusqu'à la fin de sa vie un avocat fervent de cette langue internationale.	Destinita je justico, <b>Ernesto Arŝdeakono</b> , elektis studon de modernaj sciencoj (aerostacio, aviado). Li studis esperanton en 1908. Li verkis « <b>Kial mi iĝis esperantisto</b> »(1910). Elektita prezidanto de la Franca Societo por propagando de Esperanto en 1925, li estis ĝis la fino de lia vivo fervora advokato de tiu internacia lingvo.
	

ESPERANTO-TOUR	ESPERANTOPTUR
<p><b>Le club international ESPERANTOTUR Bydgoszcz? Pologne a organisé ces croisières -cette fois 12 touristes polonais et Yunko Ošima, japonais ont voyagé 28 jours durant autour du monde, du 20/04 au 17/05/2013.</b></p> <p><i>Le voyage a débuté en avion à Varsovie, d'où le groupe Espéranto-Tour est parti pour AMSTERDAM (NL) puis pour Abu Dhabi (Emirat Arabes) pour atteindre Sydney (Australie). Ils ont visité ce plus beau port du monde avec Margaret Chaldecott, esperantiste cicéron, qui déjà plusieurs fois avait ainsi aidé Espéranto-tour.</i></p>	<p><b>Internacia Klubo ESPERANTOTUR en Bydgoszcz, Pollando aranĝis laŭvican ŝipkrozadon – ĉifoje 12 turistoj el Pollando kaj Yunko Ošima el Japanio kune vojaĝis 28 tagojn ĉirkaŭ la mondo, dum la 20-a/04 ĝis la 17-a/05/2013.</b></p> <p><i>La vojaĝo komenciĝis aviadile en Varsovio, kie la Esperantotur-grupo startis al Amsterdamo- Nederlando, sekve al Abu Dhabio en Unuigitaj Arabaj Emirejoj kaj atingis Sidneon en Aŭstralio. La plej belan havenon de la mondo oni vizitis kun Esperanto-ĉiĉeronado de S-ino Margareta Ĉaldekoto kiu plurfoje jam tion ofereme faris por Esperantotur-grupoj en Sidneo.</i></p>
<p>Du <b>24/04 au 11/05/2013</b> les 12 personnes d'Espéranto-Tour dans 6 confortables cabines ont fait une croisière sur le "Rhapsody of the Seas" de la compagnie maritime RCCL -ensemble avec 2800 touristes et plus de 800 membres d'équipage, de 70 pays.</p> <p><i>Cette fois la plus grande partie des passagers était australiens et la langue anglaise dominait. Cependant ce goupe de 12 personnes utilisèrent le polonais (d'autres polonais étaient présents sur le bateau) mais surtout tous les jours lors des nombreux repas, l'Espéranto, dans le bon restaurant "Edelweiss".</i></p>	<p>Dum la <b>24-a/04 ĝis la 11-a/05/2013</b> la 12-persona Esperantotur-grupo en ses komfortaj kajutoj bonege ŝipkrozadis per ŝipo "Rhapsody of the Seas" de RCCL-ŝipkompanio, kune kun ĉ. 2800 turistoj kaj pli ol 800 membroj de ŝipanaro el 70 landoj de la mondo.</p> <p><i>Ĉi-foje la plej multaj pasaĝeroj estis el Aŭstralio kaj dominis kiel en ĉiuj ŝipkrozadoj uzado de angla lingvo. Tamen nia 12-persona grupo uzis ne nur polan lingvon (surŝipe estis ankaŭ aliaj poloj), sed ĉefe dum ĉiutagaj komunaj abundaj vespermanĝoj ni uzis Esperanton en bona ŝipa restaŭracio</i></p>
<p>La nourriture était illimitée, et dans plusieurs restaurants et bars du bateau, particulièrement pendant les longues traversées sur le Pacifique. Pour perdre l'excès de calorie il était possible d'utiliser chaque jour : jacuzzi, sauna, spa, des appareils de Fitness et même courir sur le pont du bateau.</p>	<p><i>"Edelvejso".</i></p> <p>La manĝado estis nelimigita, en pluraj restaŭracioj kaj drinkejoj de la ŝipo, precipe kiam tuttage ni ŝipkrozadis tra Pacifiko. Por perdi troajn kaloriojn eblis uzi ĉiutage jakuzion, saŭnon, spaon kaj sportajn ilojn fitnessajn kaj eĉ kuradis en promeneja ferdeko de la ŝipo.</p>
<p>Tous nos touristes sont revenus très contents et prévoient déjà d'autres voyages autour du monde.</p> <p>Ajoutons que <b>ESPERANTOTUR</b> organise les voyages mondiaux les moins chers. En général les voyages autour du monde durent 3 mois à partir de 30 mille Dollards US.</p> <p>Du <b>9-04 au 4-05-2014</b> d'Australie - Nouvelle Zélande, Polynésie Française, Hawaï, USA. Du <b>29.04 – 20.05.2014</b> de Chine par La Corée du Sud, le Japon, l'Alaska, les USA. Et du <b>9.05 – 25.05.2014</b> du Japon par la Russie (Kamchatka), le Canada. Le détail de ces voyages sur Espéranto-Tourisme : <a href="#">Voir le calendrier d'espéranto-Tour pour 2013-2014 pour le consulter ou s'inscrire</a></p>	<p>Ĉiuj niaj turistoj revenis tre kontentaj kaj jam planas sekvontajn ĉirkaŭmondajn vojaĝojn.. <a href="#">Valoras aldoni, ke aktuale ESPERANTOTUR aranĝas la plej malmultekostajn ĉirkaŭmondajn vojaĝojn. Ĝenerale la ĉirkaŭmondaj luksaj ŝipkrozadoj daŭras ĉ. 3 monatojn kaj kostas ekde 30 mil USD.</a></p> <p>Dum <b>9.04 – 4.05.2014</b> el Aŭstralio tra Novzelando – Franca Polinezio – Havajo - Usono, dum <b>29.04 – 20.05.2014</b> el Ĉinio – Suda Koreio – Japanio – Alasko – Usono kaj dum <b>9.05 – 25.05.2014</b> el Japanio – Rusio (Kamĉatko) - Kanado. Detaloj pri la ĉirkaŭmondaj vojaĝoj aperos en Turisma Esperanto. <a href="#">Kalendaro de Esperantotur por 2013 – 2014 jam nun eblas informiĝi ĉe ni kaj aliĝi.</a></p>

**Andrzej Grzebowski**  
**INTERNACIA KLUBO**  
**"ESPERANTOTUR"**  
**str. M.SKŁODOWSKIEJ-**  
**CURIE**  
**10, PL 85-094 BYDGOSZCZ,**  
**POLLANDO**  
**TEL/FAX: +48 52 346-11-51**  
**e-mail: esperantoturismo@**  
**wp.pl, info@esperant**  
**o.bydgoszcz.eu**  
**kajandreo@rubi**  
**kon.net.pl0**

CELEBRITES	FAMULOJ
<p>Lydia Zamenhof (née en 01-1904 à Varsovie), la plus jeune fille de l'initiateur de l'Espéranto, L. L. Zamenhof, sous le régime tsariste russe, développa activement l'Espéranto. Vers 1925, elle devint bahaïste. Fin 1937, elle alla aux USA enseigner la religion bahaïste et l'Espéranto.. En 1938, à cause de problèmes d'immigration, elle dut retourner en Pologne, où elle continua à enseigner l'Espéranto et traduire de nombreux livres bahaïstes en espéranto. D'origine juive, elle fut exterminée dans le camp nazi de Tréblinka après l'été 1942..</p>	<p>Lidja ZAMENHOF (naskiĝinta en 01-1904 en Varsovio), la plej juna filino de la iniciatinto de Esperanto, L. L. Zamenhof, en la Rusa Imperio, estis agema antaŭeniganto de Esperanto. Ĉirkaŭ 1925, ŝi estiĝis ano de la Bahaa movado. Fine de 1937, ŝi iris al Usono por instrui la Bahaan religion kaj Esperanton. En 1938, pro enmigradaj problemoj en Usono, ŝi devis reiri al Pollando, kie ŝi daŭre instruis kaj ankaŭ tradukis Esperanten multajn Bahaajn verkojn. Jud-devena, ŝi estis murdita en la nazia ekstermejo Treblinkao, iam post somero 1942.</p>






BONJOUR « LES VERTS »	BONAN TAGON ! LA VERDULOJ
<p>J'ai profité de la réception d'un message d' EELV (Europe Ecologie les Verts), appelant à la défense des langues régionales, pour leur envoyer le message suivant : "Bonan tagon".</p> <p>1° <b>Bravo</b> pour cette excellente initiative en faveur des langues de France, indispensable patrimoine, qu'il est impératif de conserver ! Partout où je peux, je propose de chanter en occitan, (et parfois <b>aussi en espéranto</b>) pour montrer la beauté de ces langues.</p> <p>2° Mais une autre bataille me semble tout aussi importante, c'est la <b>défense du français</b>, de plus en plus menacée par l'invasion de la langue des multinationales, qui, par tous les moyens, cherchent à nous imposer leur monde ultra-libéral.</p> <p style="text-align: right;"><b>Emile Mas</b> assoc " ESPERANTO et DIVERSITE des LANGUES) 2 rue de l'espéranto 47 190 Galapian 05 53 87 84 58</p>	<p>Mi profitis ricevon de mesaĝo de EELV (Eŭropaj Ekologiaj Verduloj) alvokanta je la defendo de la regionaj lingvoj, por sendi al ili la sekvantan mesaĝon :</p> <p>1° <b>Bravo</b> pro tiu bonega iniciativo favore al la francaj regionaj lingvoj, nepre necesa heredaĵo, kiun necesas konservi !</p> <p>Ĉie, kie mi povas, mi proponas kanti en la okcitana, (kaj <b>kelkfoje en Esperanto</b>) por montri la belecon de tiuj lingvoj.</p> <p>2° Sed alia batalo, ŝajnas al mi tiom impona, estas la defendo de la franca lingvo, pli kaj pli minacita pro invado de la lingvo de la multnaciaj entreprenoj, kiuj per ĉiuj rimedoj provas trudi al ni sian ultraliberalisman mondon</p> <p style="text-align: right;"><b>E. Mas</b> "ESPERANTO kaj DIVERSECO DE LA LINGVOJ) 2 strato de espéranto 47 190 Galapian 05 53 87 84 58</p>
<p style="text-align: center;"><b>INSTITUT FRANCAIS D'ESPERANTO</b></p> <p>L'institut linguistique, commun à UFE et Sat-amikaro, informe :</p> <p>Claude Roux n'a pas renouvelé sa candidature à la présidence. Vinko Markov a été élu à l'unanimité. Il y a 2 vize présidentes : Janine Dumoulin et Mireille Grosjean. Le secrétaire reste Jak Le Puil, le trésorier Michel Dechy, la directrice des examens Anne Jausions (avec l'aide des membres : Janine Dumoulin, Vinko Markov, Christian Rivière et Renée Triolle) et le responsable du Net, Pierre Dieumegard.</p> <p><u>Les oeuvres à étudier pour l'examen supérieur sont:</u></p> <ul style="list-style-type: none"> <li>• La fotoalbumo de Trevor Steele</li> <li>• Ĉu vi konas Blaise Cendrars? de Manuel de Seabra</li> <li>• Kredu min Sinjorino de Cezaro Rossetti</li> <li>• Ne ekzistas verdaj steloj de Liven Dek</li> </ul> <p>Le tarif de l'examen du 1er degré est de 10 € &lt; franca-esperanto-instituto.net&gt;. Ĵak Le Puil Sekretario</p>	<p style="text-align: center;"><b>FRANCA ESPERANTO-INSTITUTO</b></p> <p>La lingva institucio komuna al UFE kaj SAT-Amikaro informas :</p> <p>Klaŭdo Roux ne renovigis sian kandidatiĝon al prezidanteco. Vinko Markov, unuanime estis elektita. Estas du vicprezidantinoj: Janine Dumoulin kaj Mirejo Grosjean. La sekretario plu estas Ĵak Le Puil, la kasisto, Michel Dechy, la direktorino de la ekzamenoj, Anne Jausions (kun la helpo de la ceteraj membroj de la ekzamena centro: (Janine Dumoulin, Vinko Markovo, Christian Rivière kaj Renée Triolle) kaj la respondeculo de la TTT-ejo, Pierre Dieumegard.</p> <p><u>La studentaj verkoj por la Atesto pri Supera Lernado estas:</u></p> <ul style="list-style-type: none"> <li>• La fotoalbumo de Trevor Steele</li> <li>• Ĉu vi konas Blaise Cendrars? de Manuel de Seabra</li> <li>• Kredu min Sinjorino de Cezaro Rossetti</li> <li>• Ne ekzistas verdaj steloj de Liven Dek</li> </ul> <p>La tarifo por la unuagrada ekzameno estas nur 10 eŭroj. &lt; franca-esperanto-instituto.net&gt;. Ĵak Le Puil Sekretario</p>
<p style="text-align: center;"><b>CELEBRITES</b></p> <p>Raymond Schwartz (1894-1973) – né à Metz, alors allemande-, sa famille est francophone ; il y reçoit une bonne éducation, parle le français et l'allemand, apprend le latin et le grec. <b>Très tôt il apprend l'espéranto</b> et rêve d'un futur de paix grâce à cette langue équitable. En 1912, il publie des pièces en rimes, puis après la guerre des poèmes et des articles dans différents magazines. Il fonde le Cercle amical en 1913. Après la guerre, il s'installe à Paris. Il joue dans les cabarets espérantophones, où il crée de nombreux sketches. À Montmartre, il dirigea des cabarets espérantistes : « Verda Kato » 1920-1926, « Bolanta kaldrono », 1936-1939, « Tri koboldoj » 1944 à 1956.. Ses sketches et ses livres sont très amusants et spirituels, pas toujours très prudes. Son roman Kiel akvo de l'rivero, (1963), est un des plus longs et des meilleurs romans écrits en espéranto.</p>	<p style="text-align: center;"><b>FAMULOJ</b></p> <p>Remondo Ŝvarc (1894-1973) - naskiĝis en Metz tiam germana-, lia familio estas francparolanta, li ricevas bonan edukon, parolas la francan kaj la germanan, studas la grekan kaj latinan. <b>Tre frue, li lernas esperanton</b> kaj revas pri paca futuro danke al tiu egalrajta lingvo. En 1912, li publikas teatraĵojn en rimoj, kaj, post la milito, poemojn kaj artikolojn en diversaj popolaj magazinoj. Li fondas amikan rondon en 1913. Post la milito, li instaliĝas en Parizo. Li ludas en esperantaj kabaretoj, kie li kreas multajn skeĉojn. En Monmarto, li estras esperantistajn kabaretojn «Verda Kato» 1920-1926, « Bolanta kaldrono », 1936-1939, « Tri koboldoj » 1944 à 1956. Liaj skeĉoj estas tre amuzaj kaj spritaj, ne ĉiam decaj. Lia romano « Kiel akvo de l'rivero (1963) estas unu el la plej longaj kaj bonegaj romanoj skribitaj en esperanto.</p>



DEVELOPPER SECRETEMENT L'ESPERANTO	NI DISVASTIGU ESPERANTON SEKRETE
<p><i>Ne pas faire de propagande pour l'espéranto; cela ne sert qu'à effrayer les gens, argumente Zlatko Tišljar. Mais les espérantistes ne doivent pas s'enfermer non plus. Mieux vaut participer dans des organisations et des projets, en utilisant la langue pour de plus vastes buts communs.</i></p> <p>...Si nous avons un bon projet, le nom « Espéranto » ne gêne pas les décideurs. Ils approuvent. De nos jours, des organisations espérantistes : associations et entrepreneurs réalisent des dizaines de projets, auxquels sont affectés environ deux millions d'euros.</p> <p>Non seulement, déjà 3 organisations et 5 espérantistes sont membres d'une Plateforme multilingue, créée par la Commission Européenne, mais des chefs de projets participent dans des commissions et groupes de travail concernant l'analyse des fondations. Ils sont partout actifs, ont des propositions intéressantes, et contribuent bien au sujets traités. Partout, les experts, avec qui ils collaborent, voient en eux des personnes de qualité et perdent leurs préjugés : l'espéranto n'est pas une secte</p> <p><b>Cela pourrait être une tactique pour faire avancer l'espéranto.</b></p> <p>Participons donc dans diverses actions internationales, non espérantistes, selon nos capacités, et partout où nous participons utilisons sans honte entre nous l'espéranto, sans en dire quoique ce soit aux autres. Quelle langue parlez-vous ? Répondez, et rien de plus. Si les intéressés demandent plus, répondez brièvement, comme d'un sujet personnel.</p> <p><b>Nous provoquons ainsi une curiosité maximum.</b></p> <p>Pour cette tactique, il est bien sûr nécessaire, que, dans les associations internationales et projets, participent ensemble plusieurs espérantistes.</p> <p>Mais ce comportement est utilisable aussi dans divers secteurs et autres associations internationales. Il ne faut qu'un peu de coordination. <b>Par exemple, lors de conférences de l'Unesco, participent 3 ou 4 espérantistes. Faisons de même.</b></p> <p>Zlatko Tišljar (d'un article de libera folio)</p>	<p><i>Ne indas propagandi por Esperanto – por ne fortimigi homojn, argumentas Zlatko Tišljar. Sed la esperantistoj ankaŭ ne enfermu sin en siajn proprajn rondojn. Oni aktive partoprenu en internaciaj organizaĵoj kaj projektoj, uzante la lingvon en laboro por pli vastaj komunaj celoj.</i></p> <p>...Se ni faras bonan projekton, ne ĝenas decidantojn la nomo « Esperanto ». Ili aprobas. Nun diversaj Esperanto-organizaĵoj, -asocioj kaj -entreprenoj realigas dekon da projektoj, por kiuj estas aprobitaj ĉirkaŭ 2 milionoj da eŭroj...</p> <p>Ne nur ke jam 3 organizaĵoj kun 5 esperantistoj membras en Multlingvisma platformo, kiun starigis Eŭropa Komisiono, sed esperantistaj gvidantoj de projektoj partoprenas en komisionoj kaj laborgrupoj rilate la analizadon de la fondaĵoj. Ili estas ĉie aktivaj, havas konstruinteresajn proponojn kaj kvalite kontribuas al la temoj tie traktataj. Ĉie tie la gravuloj kun kiuj ili kunlaboras, vidas en ili kvalitajn personojn kaj perdas antaŭjuĝojn ke esperantistoj ne estas sektanoj...</p> <p><b>Tio povus esti taktiko por antaŭenigi Esperanton.</b></p> <p>Ni partoprenu organizite en diversaj agadoj internaciaj neesperantistaj, laŭ niaj kapabloj, kaj ĉie kie ni partoprenas, ni ne hontu inter ni uzi Esperanton, sed ni neniam al aliaj diru ion ajn pri tio. Ili mem demandos. Kaj ni konduku, kvazaŭ tio estas nia trezoro, kiun ni ne volonte dividus kun aliaj. Kiu lingvo estas tiu ? Respondu: Esperanto, sed aldonu nenion plian. Se la interesiĝanto plu demandas, ĉiam respondu mallonge, kvazaŭ tio estas io via, kio la alian ne koncernas.</p> <p><b>Tiel, ni provokas maksimuman scivolemon...</b></p> <p>Por tiu taktiko estas evidente necese, ke en iuj internaciaj asocioj kaj projektoj partoprenu pluraj esperantistoj.</p> <p>Sed tia konduto estas uzebla ankaŭ en tre diversaj fakaj kaj aliaj internaciaj organizoj. Necesas nur iom da kunordigado. <b>Ekzemple okaze de Unesko-konferenco ĉeestas 3 aŭ 4 esperantistoj. Oni faru same...</b></p> <p>Zlatko Tišljar (el artikolo el libera folio)</p>




CELEBRITES	FAMULOJ
<p><b>Emile Grosjean-Maupin</b> (1863-1933), esnègnant franĉais et un de plus éminents dictionnariste d'espéranto, membre du Comité linguistique (1919), de l'Académie d'Espéranto et son directeur du Dictionnaire Commun de 1930. Il devint espérantiste en 1906 et s'occupait toujours presque exclusivement des questions linguistiques. Il fut rédacteur de nombreuses critiques, d'articles dans de nombreuses gazettes, de « L'Espérantiste Français », collaborateur de l'Encyclopédie d'Espéranto.</p>	<p><b>Emilo Groĵan-Mopeno</b> (1863-1933) estis franca instruisto kaj unu el la plej gravaj Esperanto-vortaristoj, ano de la Lingva Komitato (1909), de Akademio de Esperanto kaj ties Direktoro de la Komuna Vortaro de 1920. Li esperantistiĝis en 1906 kaj okupiĝis ĉiam kaj preskaŭ ekskluzive pri lingvaj demandoj. Li verkis tre multajn recenzojn kaj prilingvajn artikolojn en multaj tiam gravaj gazetoj, redaktoro de Franca Esperantisto, kunlaboranto de la Enciklopedio de Esperanto.</p>



<p><b>5e Congrès Africain d'espéranto</b>  <b>29-12-2013* 03-01-2014</b>  <b>Cotonou (Bénin)</b></p>	<p><b>5a Afrika Esperanto-Kongreso</b>  <b>29a-12-2013* 4a-01-2014 Kotonuo</b>  <b>(Benino).</b></p>
<p>Savez-vous que parmi les 70 associations nationales de l'UEA, 17 sont africaines ? Il existe des mouvements très actifs sur ce continent. Peut-être les occidentaux n'en ont-ils pas suffisamment conscience, car très peu d'espérantistes africains réussissent à venir à des congrès en dehors de l'Afrique, à cause de problèmes de visas. La solution est donc d'organiser un congrès en Afrique même. Quatre congrès se sont déjà déroulés en Afrique, mais le dernier a eu lieu en 1995...Voici le temps du cinquième !</p> <p><b>Mais, pour qu'il puisse se dérouler, les organisateurs ont besoin d'argent, SURTOUT pour permettre aux espérantistes africains de venir à Cotonou....</b></p> <p><b>Espéranto-France le collecte auprès de vous....</b></p>	<p>Ĉu vi scias, ke el la 70 landaj asocioj de UEA, 17 troviĝas en Afriko? Ekzistas viglaj movadoj sur tiu kontinento. Okcidentanoj eble ne sufiĉe konsciiĝas pri tio pro la fakto, ke tre malmulte da afrikaj esperantistoj sukcesas atingi UKojn aŭ aliajn kunvenojn ekster Afriko pro vizaj problemoj. Do la solvo estas kongresi en Afriko mem. Okazis jam 4 afrikaj kongresoj, sed la lasta okazis en 1995. Jen tempo por la kvina!</p> <p><b>Sed por okazigi ĝin, la organizantoj bezonas monon, precipe por ebligi al afrikaj esperantistoj vojaĝi al Kotonuo...</b></p> <p><b>Espéranto-France kolektas ĝin de vi ...</b></p>
<p><b>Votre contribution aidera à :</b></p> <ul style="list-style-type: none"> <li>• la venue d'au moins une personne de chacun des 17 pays africains ayant une association en relation avec l' UEA</li> <li>• l'organisation d'une réunion (physique) de la Commission Africaine de l'UEA</li> <li>• la rencontre d'espérantophones de différents pays d'Afrique et d' espérantophones venus du monde entier.</li> </ul> <p>En bref, au succès d'un véritable congrès africain !          Envoyez vos dons à :</p> <p style="text-align: center;">Espéranto-France          4 bis, rue de la Cerisaie          75004 Paris</p> <p>en précisant "pour le succès du congrès africain 2013"          Un reçu de déduction fiscale vous sera adressé.</p>	<p>Via financa kontribuo helpas al :</p> <ul style="list-style-type: none"> <li>• partoprenigo de minimume po unu persono el ĉiuj 17 afrikaj landaj asocioj (LA) de UEA.</li> <li>• organizo de kunveno (fizika) de Afrika Komisiono.</li> <li>• renkontiĝo de diverslandaj afrikaj esperantistoj inter si kaj kun eksterafrikaj esperantistoj el la tuta mondo.</li> </ul> <p>Entute al sukcesigo de vera afrika kongreso!          Bonvolu sendi viajn ĉekojn al :</p> <p style="text-align: center;">Espéranto-France          4 bis rue de la Cerisaie          74004 Paris</p> <p>klarigante: "por sukcesigo de la afrika kongreso 2013"          Fiska atesto estos sendita al vi..</p>




CELEBRITES	FAMULOJ
<p><b>Henrik SEPPIK (Sepamaa)</b> -(09/02/1905 *04/02/1990)                  pionnier du mouvement estonien, enseignant d'espéranto, grammairien et dictionnariste. Il était lecteur d'espéranto à l'université populaire, enseignant « méthode Cseh » et propagandiste. Seppik fut le fondateur de la commission touristique d'Espéranto, qui organisa l'échange touristique.. Seppik débuta par des traductions, fit paraître entre autres « <b>le cours systématique d'espéranto</b> » et le célèbre livre de cours « <b>La tuta Esperanto</b> »</p>	<p><b>Henrik SEPPIK (Sepamaa)</b> -(09/02/1905 *04/02/1990) :                  pioniro de la estona movado, Esperanto-instruisto, gramatikisto kaj vortaristo. Li estis lektoro de Esperanto en la Popola Universitato, Cseh-metoda instruisto kaj propagandisto. Seppik estis fondanto de la estona Esperanta Turista Komisiono, kiu organizis turisman interŝanĝon .                  Seppik debutis per tradukoj, aperigis i.a «<b>Sistema kurso de Esperanto</b> » kaj la faman kurslibron « <b>La tuta Esperanto</b> »,</p>






JOURNEE DES LANGUES	TAGO DE LINGVOJ
<p>Les élèves du secondaire de 12 à 18 ans ont fêté le 26 septembre 2013 “l’<i>European Day of Languages</i>” à Győr, en Hongrie. Ce ne seront pas seulement des élèves hongrois qui ont participé à cette « Journée des Langues », mais aussi des élèves allemands de Herzberg am Harz et des italiens de Mazara del Vallo, dans le cadre du Projet Comenius « GUTO » (Visite du château local à la Maison Européenne)</p> <p>Ces trois groupes linguistiques (allemand, hongrois, italien) appartiennent à trois différentes familles de langues, mais ils communiqueront dans une seule langue, que tous ont apprise et parlent à l’école : une langue neutre internationale, <b>l’espéranto</b>.</p> <p>Le programme de cette Journée Européenne des Langues comprenait la présentation des langues maternelles des élèves et de l’espéranto, la langue commune des participants. Ce fut aussi l’occasion de comparer des mots et des structures grammaticales; par ailleurs un quizz et une exposition ont été organisés, non seulement dans l’école hongroise, mais aussi en Allemagne et en Italie.</p>	<p>12-18-jaraj mezlernejoj el Herzbergo am Harzo kaj Mazara de la Valo dum studvojaĝo al Gjoro, Hungario, enkadre de la Comenius-projekto « GUTO » ( Vizito de la loka kastelo al la Eŭropa Domo) la 26an de septembro organizis Lingvan Tagon en la hungara gastiganta lernejo en Gjoro kaj festis la Eŭropan Tagon de Lingvoj.</p> <p>La tri partnergrupoj (germana, hungara kaj itala) apartenas al tri diversaj lingvaj familioj sed ili havas ion komunan: ĉiuj lernas kaj parolas <b>Esperanton</b> – la neŭtralan internacian lingvon.</p> <p>La programo de la Eŭropa Tago de Lingvoj enhavis prezentadon de la gepatraj lingvoj de la lernantoj kaj de Esperanto, la komuna lingvo de la partnereco. Okazis ankaŭ komparado de vortoj kaj gramatikaj strukturoj, lingva kvizo kaj ekspozicio estis pretigata ne nur en la hungara lernejo sed ankaŭ en Italio kaj Germanio.</p>
<p>Nous souhaitons faire pendre conscience, aux élèves, des autres langues et cultures, en leur montrant qu’il peut y avoir aussi une unité, une harmonie, dans cette diversité.</p> <p>Des informations sur cette journée peuvent être consultées sur le site du Conseil de l’Europe et sur celui de la Journée Européenne des Langues.</p>	<p>lernantojn pri respekto al aliaj gepatraj lingvoj kaj kulturoj kaj montri al ili, ke povos esti diverseco samtempe kun unueco kaj harmonio.</p> <p>Pri nia Esperanto-projekttago aperis informo sur la paĝaro de la Konsilio de Eŭropo kaj tiu de la Europa Tago de lingvoj.</p>
<p><b>Info</b> : Zsofia Korody - Interkultura Centro Herzberg - <a href="http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=77507155">http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=77507155</a></p>	
<p><i>Vous recevez notre bulletin trimestriel, nous serions heureux de connaître vos appréciations. Vous pouvez le donner à des voisins pour les informer sur l’Espéranto.</i></p>	<p><i>Vi ricevas nian trimonatan bultenon, ni estus feliĉaj ricevi viajn aprezojn . Interese ke vi donu ĝin al najbaroj, por informi ilin pri Esperanto.</i></p>
CELEBRITES	FAMULOJ
<p><b>Emilio Herrera Linares</b> (1879-1967 ) parmi les premiers pionniers du mouvement espagnol, s’occupa de divers sujets, où il brilla et fut remarqué. Il collabora avec avec l’Association Internationale Espérantiste des Sciences ISAE. En 1929, il participa au congrès espagnol d’Espéranto à Oviedo, fit une conférence sur son voyage en Zéppelin, regroupa d’éminents espérantistes de l’art et des sciences. Il fit des conférences sur l’espéranto et publia des articles sur l’espéranto et sur les voies aériennes dans des revues populaires.</p> <p>– Dans les archives des exilés républicains on trouve des documents en espéranto de correspondance avec les espérantistes mexicains.</p>	<p><b>Emilio Herrera Linares</b> (1879-1967 ). Frua pioniro de la hispana Esperanto-movado, li okupiĝis pri diversaj fakoj, en kiuj li brilis kaj famis. Li kontaktis kun la Internacia Scienca Asocio Esperantista ISAE, kun kiu li kunlaboris. En 1929, li partoprenis la hispanan kongreson de Esperanto en Oviedo, kie li prelegis pri sia vojaĝo en zepelino, arigis eminentajn esperantistojn en scienco aŭ arto. Li prelegis pri Esperanto, kaj publikigis artikolojn en popularaj revuoj, pri E-o kaj scienco kaj pri aerlinioj. En arĥivoj de la Ekzilita Respublika Registaro troviĝas dokumentoj en Esperanto pri liaj korespondaĵoj kun samideanoj en Meksikio.</p>



COMMENT PUBLIER DES ARTICLES SUR L'ESPERANTO DANS LES SA REGION ?	KIEL APERIGI ARTIKOLOJN PRI ESPERANTO EN LA GAZETARO DE SIA REGIONO ?
<p>Grâce à la collaboration de Brian Barker et Emile Cid concernant la campagne d'information pour le Congrès Universel de 2013, une action importante a eu lieu. <b>Chacun put profiter de l'importante campagne d'UEA pour réussir à faire paraître gratuitement des articles sur l'espéranto dans sa région.</b></p>  <ul style="list-style-type: none"> <li>• En allant sur : <a href="http://uea.org/vikio/Projekto_126_-_Justa_Komunikado">http://uea.org/vikio/Projekto_126_-_Justa_Komunikado</a> : on trouvait les propositions de Brian pour des textes aux journaux et des symboles graphiques pour des affiches et sur la journée de l'espéranto (26 juillet).</li> <li>• En allant sur : <a href="http://www.gazetaro.co.nr">www.gazetaro.co.nr</a> , on trouvait des propositions d'articles aux gazettes locales sur le fait, que soi ou des amis voyagent à un congrès international, où des milliers de gens de centaines de pays discutent des thèmes, en une seule langue comprise de tous l'Espéranto ; articles déjà traduits en plusieurs langues.</li> <li>• En allant sur : <a href="https://www.facebook.com/groups/gazetaro">Fejsuko/Vizaĝlibro/Facebook https://www.facebook.com/groups/gazetaro</a>, on trouvait les groupes qui s'intéressaient à la campagne.</li> </ul> <p>Il était suggéré d'envoyer les articles aux journaux juste après le 20 juin. Il était aussi conseillé de téléphoner aux rédactions, d'informer sur le thème et demander à qui l'adresser. Puis quelques jours plus tard, téléphoner de nouveau pour demander si c'était bien arrivé, si des questions se posaient sur le thème ou sur l'espéranto.</p> <p style="text-align: right;"><b>renato.corsetti@esperanto.org</b></p>	<p>Danke al la kunlaboro inter Brian Barker kaj Emilio Cid rilate al la Gazetara Kampanjo ĉirkaŭ la ĉi-jara Universala Kongreso io relative granda estis okazita.</p> <p><b>Ĉiuj povis profiti de tiu tre forta gazetara kampanjo de UEA por sukcese kaj senpage aperigi artikolojn pri Esperanto en sia regiono.</b></p> <ul style="list-style-type: none"> <li>• irante al <a href="http://uea.org/vikio/Projekto_126_-_Justa_Komunikado">http://uea.org/vikio/Projekto_126_-_Justa_Komunikado</a> : oni trovis ĉiujn proponojn de Brian pri tekstoj al la gazetaro kaj pri grafikaj simboloj por afiŝoj kaj pro la Tago de Esperanto (26 de julio).</li> <li>• Irante al : <a href="http://www.gazetaro.co.nr">www.gazetaro.co.nr</a> oni trovis proponon por artikoloj siaj lokaj gazetoj pri la fakto, ke oni mem aŭ samlandano vojaĝas eksterlanden al internacia kongreso, kie miloj da homoj el centoj da landoj diskutas plurajn temojn, en unusola lingvo komprenata de ĉiuj : Esperanto . La artikolo estis jam tradukita al pluraj lingvoj.-</li> <li>• Irante al la grupo en Fejsuko/Vizaĝlibro/Facebook <a href="https://www.facebook.com/groups/gazetaro">https://www.facebook.com/groups/gazetaro</a> oni trovis la grupon de homoj, kiuj interesiĝas pri la kampanjo.</li> </ul> <p>Estis sugestite ke oni sendu la artikolojn al la gazetaro tuj post la 20a de junio. Ankaŭ indus telefoni al la redakcio, informi pri la temo kaj demandi, al kiu oni sendu. Post kelkaj tagoj telefoni denove por demandi ĉu ĝi bone alvenis, kaj ĉu estas aldonaj demandoj pri la temo aŭ pri Esperanto.</p> <p>Kunlaboru kun UEA pri informado!</p> <p style="text-align: right;"><b>renato.corsetti@esperanto.org</b></p>

CELEBRITES	FAMULOJ
<p>Kazimierz Bein (1872-1959), polonais, plus connu sous le pseudonyme de Kabe, fut l'un des écrivains qui ont le plus œuvré pour donner un style à la littérature espérantiste des débuts. On le considérait comme le meilleur styliste durant les premiers temps de l'espéranto. Son style fluide et facile (il évitait autant que possible les temps composés à la forme active) a eu une influence considérable sur l'évolution de la langue ;</p> <p><b>Après Zamenhof il est l'auteur le plus cité dans la Plena Analiza Gramatiko qui est à l'espéranto ce que Le Bon Usage de Grévisse est à la langue française.</b></p>	 <p>Kazimiro Bein o (1872-1959), polo, pli konata sub la kromnomo Kabe, estis unu el la verkistoj, kiuj plej multe faris por doni stilon al la esperantista literaturo. Oni konsideris lin kiel la plej bonan stiliston dum la unuaj tempoj.</p> <p>Lia stilo flua kaj facila (Li kiel eble plej ne uzis la kompozitajn tempoj de verboj en la aktiva formo).</p> <p>Li havis tre imponan influon en la evoluo de la lingvo ;</p> <p><b>Post Zamenhofo, li estas la plej citita verkisto en la Plena Analiza Gramatiko, kiu estas en esperanto, tiel kiel la uzo de Bona Uzo de Grévisse en la franca lingvo.</b></p>